LSG FORUMO n–ro 144 ( 2010 )

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj



*juna viro dum geja fiero en Londono*

# GLAT-aferoj el Esperantujo kaj la tuta mondo

## Enhavo:


| | |
|---|---|
| Mesaĝo de nia prezidanto | 3 |
| Irano: seksaj minoritatoj suferas persekutadon | 3 |
| Usono: sinmortigoj de adoleskantoj pro homofobio | 4 |
| En Kurdujo GLAT-aktivuloj lanĉas gejan revuon | 5 |
| Akrobatoj senvestiĝas antaŭ la Papo | 7 |
| Hispanujo: kvar militistoj juĝitaj pro bastonado de gejo | 8 |
| Saŭd-araba princo mortigis sian amanton | 9 |
| GLAT-aj Filmoj | 10 |
| Alvoko de la Ĝenerala Sekretario de UN | 12 |
| Israelo: kondamnita Jerusalema bombisto kontraŭ Gej-Fiereca Parado | 13 |
| Honduro: malhumana murdo de juna gejo | 14 |
| Futbalo, gejoj kaj Kataro | 14 |
| Barato: neita pres-permeso al populara geja reta revuo | 15 |

L. S. G.
**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 12 EUR por 1 jaro
30 EUR por 3 jaroj
300 EUR por dumviva membreco

**Estraro**

Prezidanto [fsoghomonian@yahoo.fr]
Francis SOGHOMONIAN, Francio
17 rue Montmartre, FR-75001 Paris

Sekretario [lasekretario@gmx.net]
kaj kasisto [lakasisto@gmx.net]
Rolf KÖHLER, Germanio
Bergstr. 78, DE-01069 Dresden

Estraranoj:

Arnold VICTOR [arvimide@earthlink.net]
Apartment 1, 160 West Eleventh Street
New York City, New York 10011, USA

Harry BARRON [phsb@orange.net]

Randy DEAN [randy.dean@pobox.com]
(respondeculo pri la asocia retejo)

**FORUMO 144**
**Membrogazeto de la LSG (2010)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: [laredaktanto@gmx.net]
Maŭro ORTELLI, Italio
Juanjo, Hispanio

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro, ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

**!** *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

**Limdato por FORUMO 145:** 2011-05-25

# El la redakcio

Karaj membroj,
jam komenciĝis nova jaro kaj kiel ĉiuj jaroj, por la bona funkciado de la asocio, estas bone, se ankoraŭ vi ne faris, ke vi rekotizos por la jaro 2011.

Estas diversaj formoj por pagi la kotizon. Kotizoj aperas ĉi-maldekstre, sed vi ankaŭ povas kontroli kaj elekti pagmanieron en la interreto ĉe la paĝo http://lsg-esperanto.org/pagmanieroj.html

Se vi havas iun dubon, vi povas kontakti nian kasiston (kontaktadreson ĉi-maldekstre).

La sekvonta Forumo 145 vi havos jam post nur unu monato. En ĝi ni informos inter alie pri niaj aktivecoj dum la sekvonta UK en Kopenhago. Okazos nia jarkunveno. Ni planas renkontiĝon kun reprezentantoj de dana geja organizaĵo. Nia ligo partoprenos ĉe la Movada foiro kaj dum duona tago ni prezentos LSG al la gekongresanoj. La ekskursan merkredon ni volas komune pasigi. Do kunagu! Ankaŭ viaj proponoj kaj via kunlaboro estas tre bonvena!

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigitaj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendita al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn. Nesubskribitaj artikoloj estas de la redakcio.*

# Mesaĝo de nia prezidanto

Karaj geliganoj !

Kiel vi scias, la venonta jarkunveno de nia ligo okazos en 2011 kadre de la UK en Kopenhago.

Kvankam mi intencas partopreni ĝin, mi jam anoncu al vi, ke mi ne kandidatiĝos por pluesti prezidanto de LSG.

Nia ligo bezonas pli junajn, pli entuziasmajn, pli agemajn anojn, alidirite, ĝi bezonas novan sangon ebligantan fluon de novaj ideoj disvastigotaj per modernaj informiloj, por ke la celoj de niaj statutoj neniam estu forgesitaj.

Post miaj du sinsekvaj mandatoj evidentiĝas, ke mi ne estas taŭga por plenumi tiun taskon, kaj mi forte instigas niajn junajn an(in)ojn serioze konsideri kandidatiĝon je ajna estrara posteno.

Mi rememorigu, ke niaj statutoj permesas kandidatiĝi dum la jarkunveno, sed ĉiu povas private sciigi al mi sian kandidatiĝon.


Francis SOGHOMONIAN

***<u>Do, ne forgesu, LSG atendas vin en Kopenhago!</u>***

# Irano: seksaj minoritatoj suferas persekutadon

Human Rights Watch, organizo defendanta la homajn rajtojn, prezentis informon pri la diskriminacioj, kiujn suferas gejoj kaj aliaj seksaj minoritatoj en Irano. La seksaj minoritatoj de Irano, precipe tiuj, kiuj identiĝas kiel gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transseksuloj (GLAT) estas viktimoj kaj de la ŝtata polico kaj de normalaj homoj, ĉar ili scias ke ili riskas nenian punon.

Vi povas legi plu en la retpaĝo de Human Rights Watch (www.hrw.org) en diversaj lingvoj.



La informo aperis en jena retpaĝo: http://www.hrw.org/node/94978

## Usono: sinmortigoj de adoleskantoj pro homofobio


Dum la pasintaj monatoj diversaj adoleskantoj mortigis sin pro la persekutado en la lernejoj, nomata "bulling" en la angla lingvo, pro ilia gejeco. Diversaj homoj, post la alta numero de sinmortigoj decidis labori por ĉesigi tion, per leĝoj, publika defendado de homoj, ktp.




*Wendy Walsh*

Ekzemple Wendy Walsh, patrino de Set Walsh, 13-jara adoleskanto, kiu la pasintan 19an de septembro en sia hejmo pendigis sin kaj li estis trovita de lia patrino. Ŝi portis lin al la hospitalo kaj li fine mortis la 28an de septembro. Nun, ŝi batalas por ke la leĝo-propono konata kiel "Student Non-Discrimination Act" (Leĝo kontraŭ la diskriminacio de studentoj" finfine estu aprobita.

Pli da informo en la reto, angle, troviĝas ĉe: http://goo.gl/kG0jS (retpaĝo pri "Gay Rights" de la organizo Change.org).




Ankaŭ Ryan Murphy, kreinto de la televid-serio 'Glee', planas temigi, en unu el la venontaj eroj de la serio, la sinmortigon de gejaj adoleskantoj, viktimoj de samaĝula turmentadon.

La verkisto esperas, ke tiu frapa spektaĵo, en kiu rolas Chris Colfer kiel geja studento en altlernejo, montros al la spektantoj, kiuj suferas pro sia seksemeco, kiel sin turni antaŭ tiaj agresoj.

La notico aperis dum sinsekvo de sinmortigoj en Usono, ligitaj al seksemeco kaj persekutado. Matthew Morrison, ano de la aktoraro, gratulis al Murphy pri la nova ero per jenaj vortoj, konfiditaj al la reta revuo E! Online: "Ryan volas fari serieron pri la temo, kaj tio estas de li inteligenta ideo. Mi ne scias kion pli bonan povos fari la aktoraro. Tial mi kredas ke tiu seriero estos belega. Ryan estas tre aktuala laŭ ĉio kio okazas, do mi opinias ke ĝuste en tiu ĉi seriojaro ĝi devus okazi."

# En Kurdujo GLAT-aktivuloj lanĉas gejan revuon

Parolante en sia apartamento en vilaĝo apud Diyarbakır, en sud-orienta Turkujo, Solin kaj sia kolego Koya tiom multe timas esti rekonataj, ke ili eĉ ne permesas publikigon de nebuligitan foton pri si mem, nek volas sciigi siajn verajn nomojn. Diras Solin: “Homoj ĉi tie rigardas al samseksamo kiel al veneno, al malsano”.

Malgraŭ tiu timego, tamen, la duopo iniciatis radikalan eksperimenton, la lanĉon de la unua revuo por GLAT-aj kurdoj, la pasintan julion. Ĝi nomiĝas ‘Hevjin’, kurda vorto kiu signifas ‘interkomunumo’, la unua numero senpage havebla en la interreto kaj en malmultaj librovendejoj kaj kafejoj en Diyarbakır, urbo kun grandparta kurda loĝantaro.

Daŭris tri jaroj de obstina laboro, ĝis kiam Koya kaj Solin, ambaŭ gejaj kurdoj, pretis eldoni la unuan numeron. “Estas 15 milionoj da kurdoj en Turkujo, kaj unu el dek homoj estas geja, sed kie estas la kurdaj gejaj homoj?” demandis Solin. “Tiu estas la demando kiu kondukis al tio. Ni volis malkovri, kiel homoj esprimas sian seksecon en tiu ĉi kulturo.”

En la kurda oriento kaj plejparto de kampara Anatolio, islamaj valoroj kaj la famili-grupaj retoj malebligas vivi laŭ senkaŝe geja vivstilo. “Neniu estas malkaŝe geja,” diras Koya. “Estas malmultaj, eble du en nia grupo, kiuj estas akceptitaj en siaj familioj sub kondiĉo ne malkaŝiĝi antaŭ la komunumo.”

Gejoj havas tre bonan kialon timi tie. En Julio 2008 26-jara kurdo, Ahmet Yıldız, estiĝis la viktimo de tiu, kiu multaj kredas esti la unua honormurdo (venĝomurdo pro ofendo de la familia honoro, n.d.l.r.) de gejo en Turkujo, iam ajn publike konigita. Yıldız, kiu estis malkaŝe geja kaj reprezentis Turkujon ĉe internacia kunveno en San-Francisko (Usono) la antaŭan jaron, forlasis sian konservativan familion en sudorienta Turkujo por vivi pli malkaŝe en la okcidento. Oni mortpafis al li kiam li eliris de kafejo en kvartalo Uskudar de Istanbulo. Lia patro, Yahya, malaperis post lia morto kaj oni ankoraŭ ne trovis lin, kaj li estas nuntempe juĝita en malĉeesto pri tiu murdo.




Solin rakontas, ke – serĉante ion ajn eblan por kaŝi sian seks-orientiĝon – li fianĉiĝis kun fremda lesbanino por forpeli la suspekton de sia familio. “Oni senĉese estas en anksio, kaj mi dezirus ke mia familio ne loĝus en tiu ĉi landparto, tial mi povus esti pli malkaŝa” li diris.

Antaŭ tri jaroj Solin, Koya kaj aliaj komencis organizi sekretajn kunvenojn en siaj propraj domoj por provi fondi kurdan movadon de GLAT-aktivuloj. “Neniu havis personan aŭ politikan konscion pri tiu temo. Estis nenia ‘sana’ kompreno, pri kio signifas esti geja” diras Koya. Granda parto de la kunvenintoj estis prostituitoj.

Ankaŭ en pli liberalaj partoj de okcidenta Turkujo, akceptado de samseksemo kreskas malglate. Kvankam samseksamo neniam estis oficiale kontraŭleĝa en Turkujo, la vastkonceptaj leĝoj pri ‘publika moraleco’ ofte ofertis leĝan bazon por malpermesi GLAT-paradoj. La pasintan marton, la ministro pri Familio kaj Infaneco de la turka registaro, de la Partio por Justeco kaj Disvolviĝo (islama konservisma), ĉagrenis la grupojn por gejaj rajtoj, kiam ŝi parolis pri samseksemo kiel “kuracebla malsano”.

Lastatempa enketo indikas, ke la plejparto de la turkoj aprobas limigojn pri gejaj rajtoj. Tamen Nevin Öztop, ĉefredaktoro de la sola alia turka GLAT-revuo, Kaos GL, asertis ke la lando estas rapide transformiĝanta. “La okcidenta mondo trapasis tiun movadon antaŭ 40 jaroj, sed ni nur komencis dum la lastaj




10 jaroj, eĉ 5 jaroj,” diris Öztop. “En Turkujo tio okazadas tre rapide, tial estas kaj progresoj kaj perfortoj.”

En la revuo Kaos GL, startinta antaŭ 20 jaroj, dum la lastaj kvin jaroj aperas regula fako nomita “Mia Amata Familio”, en kiu gejaj turkoj malkaŝe intervjuas siajn gepatrojn. “Estas amuze nuntempe vidi masklecan turkan patron akceptantan sian propran gejan filon, kaj mi opinias ke same okazos finfine ankaŭ en Diyarbakır” diris Öztop.

Sed kiam la grupo de Solim kaj Koya unuafoje sin anoncis sur la sceno de geja aktivularo, ĝia kurda karaktero fariĝis fonto de malfacilaĵoj. “Multaj organizoj en

okcidenta Turkujo kontraŭstaris nin en la komenco, ĉar ni identigis nin kiel kurdoj" diras Koya. "Eĉ en tiu ĉi komunumo ni estas minoritato".

Multaj turkoj kun liberalaj ideoj nuntempe povas esti senŝancele konservemaj en sia politika vidpunkto, kio laŭ Öztop estas heredaĵo de Mustafa Kemal Atatürk, fondinto de la moderna turka ŝtato, kiu miksis liberalajn kaj nereligiajn ideojn kun firma aŭtoritatismo kaj naciisma rigardo pri la ŝtato.

Aldonis Öztop: "Mi ne intencas gradigi la diskriminaciojn, sed mi opinias ke ili [la kurdaj GLAT-aktivuloj] estas duoble diskriminaciataj".

Ili esprimis la esperon ke ilia periodaĵo, Hevjin, baldaŭ superos 2000 legantojn. En pli longa perspektivo, ili klopodas realigi tian ŝanĝiĝon, kia permesos al semseksemuloj malkaŝe paŝi tra Diyarbakır, iam en ne tro fora estonteco. "En la pasinteco estis tre populare por kurdoj, diri ke estas neniu kurda samseksemulo. Ni jam atingis la punkton, kie homoj ne plu povas diri tion."

# Akrobatoj senvestiĝas antaŭ la Papo

Kvar belaj cirkaj akrobatoj prezentis tri mallongajn akrobataĵojn antaŭ la papo kaj kardinaloj, okaze de la ĝenerala aŭdienco en Vatikano, merkredon la 15an de decembro 2010, kun sepmil homoj en la aŭskultantaro (inter kiuj multaj monaĥinoj).

Ne estas novaĵo, ke cirkaj artistoj ludas antaŭ papo: jam en 2003 papo Johano Paŭlo la 2a bonvenigis akrobatojn kaj klaŭnojn en ĝenerala aŭdienco, kaj ĝuis iliajn ludojn sur la scenejo. Minimume unufoje jare cirkistoj, el diversaj cirkaj familioj kaj grupoj, renkontas la papon.

La bildoj de la ĉi-lasta okazaĵo, tamen, ĉirkaŭflugis la mondon, eble pro la efekto de miro, kiun vekas vidi fortajn virojn senvestiĝi antaŭ la pinta reprezentantaro de tradicia kristana eklezio, kiujn oni kutimas vidi en ĉastaj kostumoj kaj kontrastaj al ĉio, kio povas deveni de ĝuo de la korpo. La kontrasto fariĝis akra precipe kun la nuna papo, kiu de trideko



da jaroj (jam kiam li estis kardinalo, prezidanta la instancon pri la katolika doktrino) ne ĉesas diskonigi asertojn pri la kontraŭnatureco de samseksemo kaj pri multaj aliaj "tradiciaj" starpunktoj.

# Hispanujo: kvar militistoj juĝitaj pro bastonado de gejo

*La gejo, agresita de kvar militistoj, de post tiam vivas en timego*

"Mi volas scii, kial ili trafis min, ĉu ili havis ion kontraŭ mi pro mia samseksemo" dufoje demandis Mikel Martín, 50-jara, aktivisto de Zutik [eŭska politika partio, n.d.l.r.] kaj ano de la geja kolektivo EHGAM, dum sia ĉeesto en la juĝo hieraŭ komenciĝinta en la tribunalo de San Sebastián (Eŭskujo), kontraŭ unu kaporalo kaj tri soldatoj (du el ili ne plu en la armeo), kiuj laŭsupoze adresis al li severan batadon la 13an de januaro 2005.

Martín, konata kiel aktivulo en EHGAM jam de 32 jaroj, memorigis hieraŭ: "De post tiu tago mi ne plu estas la sama persono", li asertis en la proceso. La agreso konsekvenciĝis en 137 tagoj de enhospitaliĝo kaj ok monatoj de psikologia terapio. "Mi timas. Nun mi estas pli malfidema, ĉar tian kruelecon mi neniam travivis. Neniam mi ŝanĝis trotuaron pro timo de alproksimiĝanto, kaj nun mi transpaŝas", li klarigis hieraŭ ĉe la telefono al El País [plej vasta hispanuja ĵurnalo, n.d.l.r.]. "Mi ĉiam pensis, ke la tuta mondo estas bona ĝis kiam elmontriĝas la malo", li aldonis.

Inter aliaj vundoj, Martín suferis pro diversaj traŭmatoj en la kapo, vundoj en la supra lipo lasintaj cikatron, multaj kontuzoj, parta dislokiĝo de la fino de la fibulo kaj krevo en la maldekstra patelo. Atestanto certigis, ke li vidis la militistojn (kiuj renkontiĝis dum manovroj en la kazerno Loyola) doni al li batojn pli ol kiom la aktivulo memoras.

Martín raportis, ke la nokton de la okazaĵo li eliris de ĉina restoracio kaj aliris al geja trinkejo, kiam kvar junuloj, "kun ne amikema vizaĝo", alproksimiĝis kaj insultis lin: "Vi certe estas unu el tiuj, kiuj konsentas kun ETA". [mallongigo de Euskadi Ta Askatasuna, terorisma eŭska armeo, n.d.l.r.].

Li provis eviti la kverelon kaj foriri, sed du el la militistoj plusekvis batante, dum la aliaj du rigardis. Martín memoris, ke li revekiĝis en la hospitalo.

La akuzitoj, el kiuj du ne koncernas la armeon, raportis dum la proceso tute malan version. Laŭ ilia atesto, ili paŝis surstrate post eliro de trinkejo, timigitaj de tio, ke la klientoj rekonis ilin kiel militistojn. Tiam, unu el ili ekrimarkis Martín aklamantan al ETA kaj insultantan ilin. Unu el ili, do, komencis postsekvi Martín ĝis li atingis lin kaj donacis al li "pugnobaton kaj manfrapon". La kvar militistoj kuris kaj kaptis taksion, el kiu ili eliris antaŭ ol atingi la kazernon, kaj disiris duope, por ŝajni nerimarkindaj.

La prokuroro postulas unu kaj duonan

jaron de karcero por la du supozitaj rektaj agresintoj, kaj monpunon por la aliaj du. Kontraŭe de tio kaj la akuzisto propra al Martín, kaj la popola akuzisto, kiu reprezentas la organizojn Zutik kaj EHGAM, postulas tri jarojn de karcero.

## Saŭd-araba princo mortigis sian amanton



La observadokamerao de la hotellifto laŭdire montras la princon kiel li brutale pugnobatas sian serviston.

Oni akuzas la princon, ke li batis, seksperfortis kaj fine sufokis sian 32-jaran serviston en Londono. Krome lia subulo estis laŭdire pli sekssklavo ol servisto.

Pro tiuj krimoj princo Saud Abdelasis bin Nasser al-Saud (34-jaraĝa) merkrede en Londono estis akuzata. La akuzantoj uzas kiel pruvmaterialon la videon el la lifto de la londona hotelo, kiu estis registrita tri semajnojn antaŭ la morto de la viktimo.

Pro la batoj unu orelo de la viktimo laŭdire estis ŝvelinta al plurfoja grandeco. Atestantino sciigis, ke necesis belecoperacio por remeti ĝin en la antaŭan staton. Simile gravaj estis laŭ la obdukcia raporto la vundoj, kiuj ĉe denova simila fitraktado de la viktimo fare de la princo kondukis al ties morto.

Pliaj pruviloj montras, ke la krimoj laŭ la prokuroro havis ankaŭ seksan fonon kaj laŭ tio princo Saud Abdelasis estas samseksema. La akuzato tamen plu asertas pri si, ke li estas heteroseksema. Tio ne surprizas iun, ĉar samseksemo en Saŭd-Arabio estas kontraŭleĝa kaj kondamnata eĉ per la mortopuno.

"Li mensogas plu rilate la fonon de sia rilato al la viktimo" komentas la prokuroro la eldirojn de la defendantaj advokatoj, kiuj asertas, ke ambaŭ estis nur "amikoj".

Ĉu la saŭdaraba princo estu mortkondamnata aŭ ne, tion la prokuroro Leydlou translasis al la juĝistoj. Kiam la verdikto okazos, same necertas ankoraŭ.

*Laŭ la Berlina Vespera Gazeto tradukis kaj kompilis Cezar (http://karapacopanoramo.blogspot.com)*

# GLAT-aj Filmoj

***Mine Vaganti (Vagantaj Eksplodaĵoj)***




“Vagantaj Eksplodaĵoj”, la lasta filmo de Ferzan Özpetek.

Imagu ke, kiam vi diras al via patro ke vi estas gejo, li ekhavas kor-atakon. Tio estas la baza temo de la lasta filmo de Ferzan Özpetek, la turka reĝisoro de la tre fama filmo, "Hamam" ("turka banejo").

"Vagantaj Eksplodaĵoj" estas filmo, kiu rakontas la historion de Tommaso, filo de sud-itala tradicia familio Cantone *[kantone]*, kiu planas diri al sia patro dum familia noktomanĝo, ke li estas gejo, sed lia frato Antonio *[antonjo]* antaŭvenis lin kun sama konfeso.

Ĉi tiu filmo estis jam sukceso en Italujo kaj ĝi estis prezentita en la pasinta Kina Festivalo de Berlino.

La titolo venas de kutima dirmaniero, pri nekontrolebla danĝero, kaj en la filmo la danĝeron reprezentas la gejaj amikoj de Tommaso, kiuj – li timas – estas facile rekoneblaj kiel gejoj, tiele endanĝerigante lian kaŝan vivon kiel "normala" malgejo. Sed ĉiu alia ano de la familio estas prezentata en siaj "strangaj" ecoj, montrante ke ankaŭ ĉiu alia estas "vaganta eksplodaĵo" laŭ la diversaj vidpunktoj.

Pliaj informoj:
http://www.minevaganti.net/ (itale)
http://www.tengoalgoquedeciros.es/ (hispane)

---

***"Contracorriente" (Kontraŭfluo)***

Miguel (Cristian Mercado) estas juna fiŝisto, amata en Cabo Blanco, malgranda fiŝista vilaĝo de la Perua norda marbordo, kie estas tre enradikiĝintaj ideoj pri la morto.



Miguel estas edziĝinta kun Mariela (Tatiana Astengo) kiu gravedas de sep monatoj je ilia unua filo, sed li havas ekstreme sekretan amrilaton kun alia viro, Santiago (Manolo Cardona), pentristo, kiu translokiĝis al la vilaĝo ekde unu jaro, malakceptata de la vilaĝanoj ĉar li estas agnostikisma kaj malkaŝa pri sia samseksemo.

Santiago, akcidente dronas en la maro kaj revenas post sia morto por peti de Miguel, ke li serĉu lian korpon en la maro kaj entombigu lin laŭ la ritoj de la vilaĝo. Tiu estas la nura maniero, por ke lia animo ripozos en paco kaj ne vagados por eterne en ĉi tiu mondo. Miguel troviĝas en vojkruciĝo, ĉar laŭ la tradicio, nur la viro plej proksima al la mortinto okupiĝu pri lia emtombigo. Se li faras tion, li elmontros antaŭ ĉiuj sian rilaton kun Santiago kaj ruinigos sian geedziĝon kaj sian reputacion en la vilaĝo. Se li ne faras tion, li kondamnos sian amaton vagadi por ĉiam sen ripozo.

Ĉi tiu filmo estis nomita por la oficiala perua selekto kiel plej bona eksterlanda filmo por la Oskar-premio.

Pli da informo, ĉi tie (hispane): http://www.contracorrientelapelicula.com/

---

### *BearCity*

BearCity (Urs-urbo) estas komedia filmo pri grupoj da ursuloj, kiuj rekontiĝas por siaj romantikaj aventuroj. Ĝi rakontas la klopodojn de juna kandidato al ursulo, liajn aventurojn en la ursula mondo, dum li klarigas ke "agnoski, ke plaĉas al vi la ursuloj, estas kiel dufoje eliri de la ŝranko".

La filmo estis tre sukcesa dum la gejaj film-festivaloj, en kiuj ĝi gajnis diversajn premiojn, la plej gravan en la Outfest festivalo (Los-Anĝeleso).



Pliaj informoj (angle): http://www.bearcitythemovie.com/

---

### *15a Geja Kina Festivalo en Madrido*

Ekde la 28a de oktobro kaj ĝis la 7a de novembro okazis en Madrido (Hispanujo)



la 15a Geja, Lesbanina kaj Transseksula Kina Festivalo en Madrido.

Dum tiuj tagoj, oni povis spekti en du kinejoj diversajn filmojn, kiel "BearCity", "Amphetamine", "Children of God", "Homme au Bain", "Je te mangerais", kaj aliajn. Ankaŭ en diversaj kluboj kaj trinkejoj okazis diversaj eventoj, kie spektiĝis diversaj dokumentaj filmoj, pri aidoso, ursuloj, ktp.

Intertempe, ankaŭ okazis diversaj paralelaj okazaĵoj en la urbo por la GLAT-partoprenantoj.

# Alvoko de la Ĝenerala Sekretario de UN

La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Ban Ki-moon, alvokis por ke gejeco estu elkriminaligita en la tuta mondo.

Li parolis dum la pasinta Monda Tago de Homaj Rajtoj (10a de decembro), ĉe renkontiĝa tablo kun la usona ambasadoro ĉe UN, Susan Rice.

La renkontiĝo komdamnis perforton kontraŭ GLAT-homoj kaj la pluan kriminaligon de gejoj kaj lesbaninoj en pli ol 70 landoj en la mondo.

S-ino Rice diris, ke Usono devus klopodi denove enigi indikon pri gejaj homoj en UN-rezolucion, kiu kondamnos ekzekutojn. Arabaj kaj Afrikaj landoj sukcesis korekti tian peton dum voĉdono en novembro.

S-ro Ban diris: "Kiam estas malakordo inter kulturaj sintenoj kaj universalaj homaj rajtoj, homaj rajtoj devas venki. Persona malaprobo, eĉ socia malaprobo, ne estas sufiĉa kialo por aresti, reteni, enkarcerigi, persekuti aŭ torturi iun ajn, iam ajn."

Li diris, ke petis de li uganda gej-rajta kampanjisto, Frank Mughisa, ke li alvoku por la ĉesigo de ĉiuj leĝoj kontraŭ




samseksamo.

"Li petis de ni subteni la elkriminaligon de gejeco en ĉiuj lokoj de la mondo," diris S-ro Ban "kaj tio estas ja kion ni faros."

S-ro Ban aldonis: "Kune ni celos la forpelon de la leĝoj, kiuj kriminaligas samseksamon, permesas diskriminacion surbaze de seksa tendenco aŭ genra identeco kaj kiuj instigas al perforto. La homoj ne estis metitaj sur ĉi tiun planedon por vivi kun la timo de siaj homaj viv-proksimuloj."

Li urĝis ke la homoj laboru kune por ŝanĝi

sintenojn.

"Stigmato kaj diskriminacio finiĝos nur kiam ni konsentas priparoli. Tio postulas, ke ĉiuj ni faru nian parton. Priparoli – hejme, laboreje, en niaj lernejoj kaj komunumoj" li diris.

Cary Alan Johnson de Internacia Gej-Lesbana Hom-Rajta Komisiono [IGLHRK] diris, ke la deklaro de S-ro Ban estis tre grava kaj signifa. "Estis defia jaro por la GLAT-rajtoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj" li diris. "Ni vidis konservemajn fortojn, kiuj klopodis teni organizojn kiel IGLHRK ekster UN, kaj ni suferis dolorajn retropaŝojn, ĉar tiuj samaj registaroj laboras por forigi aŭ preventi protektadon de homaj rajtoj por lesbaninoj, gejoj, ambaŭseksemaj kaj transseksaj homoj. La graveco de ĉi tiu evento kaj la subteno de personoj kiel la Ĝenerala Sekretario de UN kaj la Usona Ambasadoro ne povas esti subtaksitaj".

## Israelo: kondamnita Jerusalema bombisto kontraŭ Gej-Fiereca Parado

La distrikta kortumo de Jerusalemo verdiktis, ke Michael Naky 35-jara servu dum ses monatoj en komunumo, pro tio ke li preparis improvizitan bombon por atenci gejfierecan marŝon en la urbo en la jaro 2007. La verdikto sekvis inter-akordon inter la defendo kaj la akuzo.

La eltrovo de malgranda hejme farita bombo, destinita al la gej-rajta parado, akrigis la tensioj en la "sankta urbo" Jerusalemo inter GLAT-aktivuloj kaj religiemaj judoj, kristanoj kaj islamanoj.

Jam je la fino de la parado oni arestis 18 homojn pro klopodo ĉagreni la okazaĵon. Ĉe la aresto, polica informisto Micky Rosenfeld diris ke ĉirkaŭ 2000 marŝantoj estis partoprenantaj en la Gej-Fiera parado sed "la polico haltigis 32-jaran religieman judon portantan hejmefaritan eksplodaĵon."

En Aprilo 2007 eksplodaĵon eksplodintan proksime de Jerusalemo oni konjektis faritan de ekstrem-ortodoksaj judoj protestantaj kontraŭ la gej-fierecaj okazaĵoj. La malgranda tubo-bombo eksplodis proksime de la limo kiu disigas de la Okcidenta Bordo (Cisjordanio). Unu homo vundiĝis ĉe la kruro kaj oni portis lin al hospitalo en Jerusalemo.

La eksplodo sekvis la malbenon de la evento faritan de rabenoj el la sekto Eda Haredit. Oni povis legi ilian mesaĝon: "Ĉiuj implikitoj, pekantoj en la spirito, kaj iu ajn helpanta aŭ protektanta ilin, sentu malbenon en siaj animoj, ĝi plagu ilin kaj malbono persekutu ilin; ili ne trovos pardonon pri siaj malobeoj, en la paradiza juĝo."

# Honduro: malhumana murdo de juna gejo

23-jara junulo, identigita kiel Luis Alexis Alvarado Hernández estis krude murdita en Comayagüela, proksime de la ĉefurbo Tegucigalpo, eble krimo de malamo motivita de la seksa orientiĝo de la viktimo.



Laŭ la loka gazetaro, la krimo okazis en la vilaĝo Villa Unión dum la horoj antaŭ la sunleviĝo: elirigis la viktimon el lia domo unu aŭ pluraj homoj, kiuj seksperfortis lin antaŭ ol bati lin per ŝtonoj kaj bruligi lian korpon. Krom la ekbruligilo, per kiu komenciĝis la brulo, la polico eltrovis du kondomojn en la loko de la krimo.

Ĝis nun, la najbaroj deklaris, ke estis neniu bruo aŭ krio, kiu avertis ilin de la okazo.

La loka gazetaro distingiĝas laŭ tio, ĉu la viktimo estis “transseksulo” aŭ “samseksemulo”. Laŭ ĵurnalo *La Tribuna*, "la familio asertis, ke, malgraŭ ke lia frato havis *malsaman seksan emon*, li estis tre amata".

*Senpuneco por la GLAT-viktimoj*

De du jaroj, organizoj por homaj rajtoj kaj GLAT-aktivuloj denuncadas serion de krimoj kontraŭ la Hondura samseksemula komunumo. En aŭgusto 2010 atestanton teorie "protektitan" oni eltrovis mortan, post deklaro ĉe la policejo dum enketo pri murdo de transseksulino.

En 2009, ankaŭ la murdo de aktivulo, Walter Tróchez, generis skandal-kriojn en diversaj organizaĵoj. Ankaŭ la Franca registaro sendis postulon de klarigoj pri tiu krimo.

Ĉiuokaze oni atentigas, ke de post la puĉo, kiu okazis la 28-an de junio 2009, la situacio malboniĝis plu. La rolo de la sekurecaj gardistoj, tre aparte la polico, estis kritikita kaj ĝia agado pensigas pri ia grado de kunkulpeco en la mortigoj.

# Futbalo, gejoj kaj Kataro

Marta Molina, sekretariino de Kataluna Nacia Konsilio de lesbaninoj, gejoj, ambaŭseksemuloj kaj transseksuloj, publikigis la pasintan 16-an de decembro deklaracion, kiu donas subtenon al la grupo de gejoj kaj lesbaninoj de la futbala teamo Barça (Barcelono) pro iliaj zorgoj pro tio, ke la skribaĵo “Qatar Foundation” aperas sur la t-ĉemizoj de la futbalistoj.

Ĉi tio okazis ĉar la monda futbalo en la jaro 2022 okazos en Kataro, lando kie la GLAT-homoj estas persekutataj kaj punataj je malliberejo.

De post kiam la elekto de Kataro kiel lando por la futbala Monda Pokalo en la jaro 2022 fariĝis publika, diversaj reagoj de gejaj grupoj ne haltis, inkluzive tiuj kiuj petas la bojkoton de la ludoj.

Kaj kiam la prezidanto de FIFA, S-ro Blatter (en la foto), estis demandita pri la afero, li diris: "Mi rekomendas al la gejoj ne seksumi dum la monda futbalo en Qatar".



Kompreneble, lia respondo ne plaĉis al gejoj, kiuj kritikis al S-ro Blatter. Li, poste, petis pardonon pro sia deklaro.

http://penyagl.blogspot.com/

## Barato: neita pres-permeso al populara geja reta revuo

La Registrejo de Ĵurnaloj en Barato neas permeson al populara geja magazino en interreto por presi paperan version.

La Alta Kortumo en Nov-Delhio eble favore rolis por la GLAT-movado en Barato, sed ilia batalo por akceptiĝo estas longe for de sia fina venko. La lasta retropaŝo estis de la Registrejo de Ĵurnaloj en Barato [RĴB], kiu ŝajne neis al la movado la rajton esprimi sin.

La neo de RĴB antaŭ la permes-peto por presi paperan version de la plej populara interreta GLAT-magazino "Pink Pages" igis la aktivulojn protesti pri mallojaleco. Diris Harish Iyer, Bombaja kolumnisto de la magazino, "la plej malagrabla parto estas, ke nenian kialon oni donis pri la malakcepto de la permes-peto. Ni atendis almenaŭ klarigon. Nun ni penadas kun instancoj dum monatoj."

La monata revuo estis lanĉita en Julio 2009 kaj atingis rekordon, ĉar pli ol dekmil kopioj de la magazino estis elŝutitaj de la reto. Sekvante tiun sukceson, la teamo de Pink Pages decidis publikigi presitan version de la magazino, sed ilian peton por publikigo malakceptis la registaraj instancoj oktobre. Tial, ke mankis respondo de la koncernaj instancoj, la teamo do decidis sekvi juran vojon.

Udayan Dhar, ĉefredaktoro en Bangalore, diris, ke la unua paŝo estis prezenti RĴB-formularon. "Ni iros laŭ la ĝustaj vojoj por malkovri, kial nia peto estis malakceptita. Mi dubas, ke la instancoj diros al ni la verajn kialojn de la malakcepto. Sed ni havas teamon de juraj fakuloj pretaj lukti por niaj rajtoj," li diris.

"Kelkaj magazinoj servantaj la GLAT-komunumo jam estas presataj", diris Dhar, aldonante ke tiuj akiris la permeson

ne deklarante la veran naturon de la enhavo, sed registrigis sin sub kategorioj kiaj genra kaj seksa sano. "Ni estis klaraj, pri tio ke ni estas magazino por la gej-lesbana komunumo", diris Dhar. La magazino ankaŭ ricevis subtenon de la GLAT-komunumo por lanĉi kampanjon de subskriboj kaj protestoj kontraŭ la decido de RĴB.

Dume, gej-rajtaj aktivistoj tra la tuta lando alvokis subtenon al Pink Pages. "Mi ne certas, ĉu ilian peton oni malakceptis tial ke ĝi estas GLAT-magazino. Estas similaj magazinoj presataj en aliaj urboj. Sed mi kredas, ke ili rajtas publikigi sian magazinon en papera versio. Se magazinoj propagandantaj Maoisman ideologion aŭ komunismon povas akiri permeson, Kial ne sendanĝera magazino por la GLAT-komunumo?" diris Ashok Row Kavi, membro fondinto de Bombay Dost, la unua barata geja magazino.

Entute, estas sep GLAT-revuoj en la lando, el kiuj kelkaj estas interretaj, dum aliaj estas presitaj. Fun kaj Fantasy estas eldonitaj en Nov-Delhio, Jiah kaj The Queer Chronicle (ambaŭ el la urbo Puna) kaj Gaylaxy (el la urbo Kolkata) estas interretaj revuoj.

Aktivistoj diras, ke certa pensmaniero kontraŭa al la gejeca kulturo efikas kontraŭ tiaj revuoj. "Kiam ni organizis la unuan kin-festivalon por la GLAT-komunumo, oni pridemandis nin ĉu ni intencas surekranigi pornajn filmojn. Mi opinias, ke granda problemo, kiun ni alfrontas, estas ke la homoj kunligas nudecon kaj pornografion kun geja literaturo aŭ kino. Mi sugestas, ke ni unue kreu akceptemon pri niaj temoj per disvastigo de konsciiĝo, kaj poste ni luktu por nia libero esprimiĝi", diris Keith D'Silva, eldonisto de The Queer Chronicle.

Sagar, kunordiganto de la laste prezentita Q-festivalo en la urbo, konsentis pri tio, ke la mispensado, kiun homoj havas pri GLAT-literaturo kiel esence pornografia, povas esti kialo de la malakcepto de la peto de Pink Pages. "Tia trakto ne tute fontis el la naturo de la magazino, sed el ĝia enhavo. Ni devas konvinki la instancojn, ke nia enhavo taŭgas por ĉiuj aĝogrupoj kaj por amasa legantaro", li diris. Neniu oficialulo de RĴB estis preta komenti.

